

Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,	Johann Wolfgang von Goethe,
Из Гёте	Egalajo (Noktokanto de migranto)	Super montoj regas kviet'	Same	Same tiel
<i>tradukita de Muxail Lermontov</i>	<i>tradukita de Manfredo Ratislavovo</i>	<i>tradukita de Poul Thorsen</i>	<i>tradukita de Pejno Simono</i>	<i>tradukita de Richard Schulz</i>
Горные вершины Сият во тьме ночной; Тихие долины - Полны свежей мглой; Не пылит дорога, Не дрожат листы ... Подожди немного, Отдохнешь и ты.	Super ĉio iĝas Kviet', Kaj ne moviĝas Pro ventet' Iu foli'; Silentas la birdoj ĉirkaŭe. Atendu – baldaŭe Ripozos vi.	Super montoj regas kviet', tra l' foliaro nur ventet' spiras kun trem'. Birdoj arbare silentas, se vi atendas, pacas vi mem.	Super montopintoj — silent', tra pinopingloj la senvent' spiras sen fort'; arbare la birdoj ekmutas. Pretu, aludas silento pri mort'.	Super ĉiuj montoj Trankvil', Kaj ĉiuj fontoj Sen babil'; Aŭdas vi ne Birdetan ĉirpon arbare. Pensu prepare Pri la pere'!
...

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27).

Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>. Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>. Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Mikhail_Lermontov. La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.